



La Felîca Birdo

Ĉina Esperanto-Eldonejo

e-Librigita de Elerno, majo 2006

La Feliĉa Birdo

Antaŭ tre tre longe estis malbona loko en Tibeto. Tie ne fluis rivero, ne vidiĝis kampoj, ne kreskis arbo kaj herbo. Regis neniom da varmo. La homoj vivis en mizero. Kaj neniu el ili sciis, kio estas feliĉo. Sed ĉiuj kredis, ke feliĉo ekzistas en la mondo.

Maljunuloj diris, ke feliĉo estas bela birdo. Ĝi nestas sur neĝa monto, en tre tre malproksima oriento. Kien la feliĉa birdo flugus, tie feliĉo aperus. Ĉiujare oni iris serĉi la feliĉan birdon, sed senrevne. Laŭdire la feliĉan birdon gardis tri monstroj, kapablaj iun ajn mortigi per ekblovo je la longa barbo.

Fine oni sendis la saĝan knabon Vanĝja serĉi la feliĉan birdon. Antaŭ la foriro knabinoj propones al li vinon el sekalo, patrinoj surŝutis lian kapon per sekalo, laŭ kutimo de Tibeto, kaj deziris al li bonan vojaĝo.

Vanĝja iris orienten multajn tagojn. Fine vidiĝis de malproksime montego, sur kiu neĝo brilis kiel arĝento. Tiam subite aperis monstro kun nigra barbo, kiu diris al Vanĝja kun voĉo de korvo:

“Kiu venis al mi? Kia aŭdaco! Kion vi volas?”

“Mi nomiĝas Vanĝja. Mi venis por serĉi la feliĉan birdon.”

“Ha, ha, ha!” ridegis la monstro. “Knabo, malgranda kiel ovo, aŭdacas veni ĉi tien! Se vi volas trovi la feliĉan birdon, antaŭ ĉio vi devas mortigi la patrinon de Losom; alie mi vin punos! Mi ne bezonas persone mortigi tian bubeton, kia vi. Vi mortaĉos, se mi

nur volus, ke vi iru 33 ĉevalŝanĝejoj* sur senorda gruzo.”

Vanĝja diris: “Mi amas mian patrinon; kaj mi absolute ne mortigos alies patrinon! Faru, kion vi volas!”

La monstro eksplodis de kolero. Li ekblovis la barbon, kaj tui sterniĝis ŝtonetoj, tranĉile akraj.

Kiam Vanĝja atingis la unuan ĉevalŝanĝejon; liaj botoj distranĉiĝis; ĉe la dua liaj piedoj ŝiriĝis. Kaj ĉe la tria, li havis vundojn sur la manoj. Kia malfacilo! Ĉu eblas atingi la celon? Hejmeniri? Ne! La samvilaĝanoj atendis de li la feliĉon. Li do daŭrigis la vojadon. Li pene krablis kaj krablis. La vestoj ŝiriĝis, la genuoj kaj brakoj diskarniĝis. Fine li iris ĝis la lasta ĉevalŝanĝejo... Sed ho ve! Aperis alia monstro, kun flava barbo.

“Hu-u-u!” La voĉo de la flavbarba monstro similis uraganon. “Vi deziras vidi la feliĉan birdon. Iru do veneni maljunulaĉon Sunom. Se ne, vi mortos de malsato!”

Vanĝja ĵetis rigardon al la monstro kaj diris: “Ha, kiel bele vi parolaĉis! Mi amas mian avon, mi do ne mortigos alies avon!”

La monstro furioze blovis la longan barbon, kaj la tornistro de sekaj manĝaĵoj de Vanĝja tuj flugis en la

* Ĉi tie la ĉevalŝanĝejo signifas etapon. En Tibeto du ĉevalŝanĝejoj iam distances 40 kilometrojn.

ĉielon. Kaj la verdaj montoj kaj klara rivero tuj fariĝis senlima dezerto, kie oni trovis nenion manĝeblan.

Kiam Vanĝja atingis la unuan ĉevalŝanĝejon, lia stomako murmuris; kiam li venis al la dua, mallumiĝis liaj okuloj kaj li jam kapturniĝis de malsato; kaj trapasinte la trian li jam sentis tranĉadon en la stomako... Finfine li atingis la 33-an ĉevalŝanĝejon, sed restis al li nur la haŭto sur la ostoj. Aperis la tria monstro, kunblanka barbo. Li tondris al Vanĝja:

“Kiu aŭdacas veni al mi?”

Vanĝja diris: “Mia nomo estas Vanĝja kaj mi venis por serĉi la feliĉan birdon!”

La monstro diris: “La feliĉan birdon? Prezentu al mi la okulojn de Bema! Se ne, mi tuj deprenos la viajn!”

Vanĝja iom pripensis kaj diris: “Hm, kian ideon vi havas! La belajn okulojn de knabino oni neniel devas difekti. Mi ne eligos la okulojn de Bema!”

La monstro ekflamis kaj blovis la barbon. La okuloj de Vanĝja tuj elsaltis kaj li blindigis. Li pensis: Jam la lasta turmento. Antaŭeniru, kaj tie, kie leviĝas la suno, estas la loko loĝata de la feliĉa birdo.

Palpante la teron, li rampis kaj rampis. Fine li atingis la supron de la neĝa monto. Kia feliĉo, ke li aŭdis la voĉon de la feliĉa birdo:

“Aminda knabo, ĉu vi venis por mi?”

Vanĝja ĝoje respondis: “Jes, kara birdo! Miaj samvilaĝanoj tre amas vin. Bonvolu flugi al ni!”

La feliĉa birdo kantante karesis Vanĝja per la flugiloj. La okuloj de Vanĝja reflugis al li en la kavojn, eĉ pli brilaj, pli belaj. Kaj la vundoj jam for, kaj li mem, eĉ pli fortika ol antaŭe. La feliĉa birdo regalis lin per

viando, butero kaj kuko. Poste la feliĉa birdo lin portis al lia vilaĝo.

La feliĉa birdo demandis: “Kion vi deziras?”

Vanĝja diris: “Varmon kaj feliĉon, arbaron kaj florojn kaj ankaŭ kampojn kaj riverojn.”

La feliĉa birdo kriis tri fojojn sur montsupro. Ĉe la unua, la ora suno sin elŝovis tra la nuboj kaj la varma vento alblovis. Ĉe la dua, la montoj kovriĝis de arboj.

Ĉarmaj floroj aromas. Turdoj dances kaj alaŭdoj kantis.

Ĉe la tria fojo aperies flustraj riveretoj kaj fekundaj kampoj. Petolaj leporoj ludis sur herbejo...

Kaj la homoj vivis feliĉe.

Rano-Rajdisto

Iam estis edzo kaj edzino. Ili loĝis sur malproksima alta monto. Ili trenis sian vivon de mizero al mizero.

La geedzoj pli kaj pli maljuniĝis. Ambaŭ deziris infanon. Ili diris unu al la alia: “Kiel bone estus, se ni havus almenaŭ unu infanon! Li povus fari ĉion por ni: plugi teron, semi sekalon, porti hejtaĵon... Kaj ni povus varmiĝi ĉe la fajrejo, ho, se nur momenton!”

Ili iris al Dio de Montoj kaj Riveroj, pie preĝis, kaj baldaŭ la edzino vere gravefiĝis. Post sep monatoj, ŝi naskis... — Ho ve! Ne bebon, sed ranon.

“Kiel strange!” la maljunulo diris. “Ne infaneto, sed ranaĉo, kun du grandaj, elstaraj okuloj. Ni forĵetu ĝin!”

La edzino tre bedaŭris. Ŝi diris: “Dio ne favoris nin. Dio donis al ni ranon kaj ne infaneton. Sed ni jam naskis ĝin. Ni do ne jetu eksteren. Rano vivas en marĉo. Metu ĝin en la lageton malantaŭ nia domo; kaj lasu ĝin viviti.”

La maljunulo prenis la ranon. Kiam li sin turnis al la pordo, la rano ekparolis: “Ho, paĉjo! Ho, panjo! Ne metu min en la lageton. Homo naskis min, mi do vivu kune kun homo. Kiam mi estos granda, mi fekundigos la teron kaj forigos la malriĉon!”

“Edzino! Strange!” la maljunulo kriis surprizite. “La rano parolas home.”

“Ĝi eldiris bonajn vortojn,” la edzino diris. “Ni

malriĉuloj ja devus aliĝi. Alie ni mortaĉus. Ĝi certe estas eksterordinara rano, ĉar ĝi povas paroli. Lasu ĝin ĉe ni.”

La geedzoj estis bonkoraj. Ili ne metis la ranon en la lageton. La rano vivis kun ili kvazaŭ ĝi estus ilia vera infano.

Pasis tri jaroj. Vidante, ke la maljuna paro ĉiam laboras pene, la rano diris al la maljunulino: “Panjo, morgaŭ faru por mi delikatan panon. Mi iros trans la valon al la kastelo de la tribestro. Li havas tri belajn filinojn. Mi havigos al vi bofilinon el tiu, kiu estas bonkora kaj kapabla. Ŝi venu helpi vin en la laborado.”

“Mia kara filo, ne faru tian ŝercon!” la maljunulino ridetis. “Kiu volus edzinigi sian filinon al vi; tiel eta kaj malbela rano, ofte minacata de surtreto?”

La rano insistis: “Bonvolu fari panon por mi! Ili konsentos.”

“Bone, mi faros panon,” la maljunulino fine konsentis kaj diris. “Sed mi timas, ke ili prenos vin por monstro kaj ŝutos polvon sur vian kapon.”

“Estu trankvila, panjo,” la rano diris. “Ili ne aŭdacos tion fari.”

La sekvan matenon la maljunulino faris bongustan panon kaj metis ĝin en saketon.

Kun la saketo sur la dorso, la rano saltsaltis al la tribestra kastelo.

Ĝi atingis la kastelon. Ĝi kriis laŭte: “He, tribestro! Tribestro! Malfermu la pordon!”

Aŭdinte la vokojn, la tribestro sendis serviston por

rigardi, kiu estas tie.

“Kiel strange! Mastro,” la servisto revenis kaj diris kun surprizita mieno. “Ĝas raneto, kiu kriaciĝis ĉe la pordo.”

“Via tribestra moŝto,” la intendanto diris certige. “Tio estas monstro. Mi iru ŝuti polvon sur ĝian kapon!”

“Momenton! ” La tribestro malkonsentis. “Eble ne monstro. Ranoj vivas en akvo. Eble ĉi tiu venis kun misio el Drako-palaco. Aspergu lakton al ĝi kiel al Dio. Poste mi mem akceptos ĝin.”

Laŭ la ordono de la tribestro, la servistoj bonvenigis la ranon kiel Dion. Ili ŝprucigis lakton sur ĝin kaj al la ĉielo.

Poste la tribestro iris al la pordo kaj demandis: “Raneto, ĉu vi venis el Drako-palaco? Por kio? ”

“Ne, mi mem venis,” la rano respondis, “por peti la manon de unu el viaj filinoj, ĉar ili jam atingis edziniĝan aĝon. Bonvolu doni konsenton!”

La tribestro kaj liaj servistoj tute ne atendis tion. La tribestro diris: “Absurdaĵo! Vi, tiel malgranda kaj malbela, aŭdacas fari tian peton! Multaj tribestroj venis svati kaj neniu ricevis mian aprobon. Ĉu mi edzinigu mian filinon al ranaĉo? For!”

“Vi ne emas konsenti? ” la, rano diris. “Bone, mi do ridu!”

“Sensencaĵo!” la tribestro eksplodis de kolero. Li kriis: “Ridu, ridaĉu, se plaĉas al vi!”

La rano vere ekridis. Ĝia tondra ridego multe pli laŭtis ol se tuta grego da ranoj kunridus. La tero tremis,

la kastelo ŝanceliĝis kaj la fortikaĵoj ŝajnis disfalontaj ĉiumomente. La muroj breĉiĝis. Ŝtonetoj, sablo kaj polvo ĉion atakis. La ĉielo malheliĝis. La familianoj kaj servistoj de la tribestro kuris freneze tien kaj reen puŝiĝante unu kontraŭ alia. Regis kaoso.

Fine, la tribestro ŝovis la kapon tra la fenestro kaj petegis la ranon: “Ne ridu plu. Ni mortus pro vi. Mi venigos la plej aĝan filinon, ke ŝi estu via edzino.”

La rano ĉesis ridi. La tero kvietiĝis kaj la domo restabiliĝis.

La tribestro jam kolapsis de timo. Li venigis la unuan filinon al la rano kaj ordonis la servistojn alkonduki du ĉevalojn, unu por la filino kaj la alian por ŝia doto.

La filino ne volis edziniĝi al rano. Antaŭ rajdi sur la ĉevalo, ŝi ekvidis ŝtonan manmuelilon sub la tegmentorando. Ŝi prenis la supran platon kaj kaŝis ĝin en la sino.

Surĉevalo ŝi sekvis la ranon, kiu saltetis antaŭe por direkti la vojon. Ŝi sekvis la ranon, senĉese rapidigis la ĉevalon por ke la ĉevalo tretu ĝin. La rano saltis jen maldekstren jen dekstren, tial ŝi ne sukcesis ĝin mortigi. Fine ŝi faligis la muelilon sur la ranon kaj tuj returniĝis al la hejmo.

Apenaŭ la ĉevalo ektritis, ŝi jam aŭdis vokon: “Halt, fraŭlino! Mi diros ion al vi.” Ŝi turnis la kapon kaj vidis la ranon, kiun ŝi frapegis per la muelilo. Ŝi tute ne atendis, ke la rano eliĝis tra la truo en la mezo de la muelilo.

Ŝi tre surpriziĝis kaj ne povis ne haltigi la ĉevalon. La rano diris al ŝi: “Fraŭlino, ni ne havas la destinon kuniĝi. Hejmen do, se vi volas.” Ĝi saltis antaŭn, por konduki ŝin al ŝia hejmo.

Kiam ili atingis la kastelon, la rano diris al la tribestro: “La sorto ne ligas nin. Tial mi kondukas ŝin al vi. Donu al mi alian, kiu volas edziniĝi al mi.”

“Kia aroganteco! Bone komprenu, kio vi estas!” furioze kriis la tribestro. “Vi revenigis mian plej aĝan filinon, mi do ne donos al vi alian. Ĉu mi, tribestro, devas permesi al vi elekti kaprice edzinon inter miaj filinoj?” Li tremegis de kolero.

La rano diris: “Vi ne konsentas. Nu, mi do ploru.”

La tribestro pensis, ke la plorado certe kaŭzos ion pli danĝeran ol la ridado. Li kriis rikane: “Ploru, se vi volas. Kiu timas vian ploraĉon! ”

La rano ekploris. Li ploris kaj ploris, kvazaŭ pluvegus dum somera nokto. La ĉielo malheliĝis. Fulmo kaj tondro, kaj baldaŭ torento, akvego... La akvo inundis la kastelon kaj fortikaĵon.. La familianoj kaj servistoj de la tribestro grimpis sur la tegmenton kaj senhelpe kunpremiĝis.

Fine la tribestro klinis la kapon kaj laŭte diris al la rano: “Rano, bonvolu ĉesi plori! Alie ni ĉiuj dronus. Mi donos la duan filinon al vi.”

La rano jam ne ploris kaj la akvo malaperis. La tribestro vole-ne-vole ordonis, ke servistoj elkonduku du ĉevalojn, unu por la dua filino kaj la alian por ŝia doto.

Ankaŭ la dua filino ne volis iri kun la rano. Antaŭ ol rajdi sur la ĉevalo, ŝi prenis la alian duonon de la manmuelilo kaj kaŝis ĝin en la sino. Survoje ŝi faris la samon kontraŭ la rano.

Kaj la rano haltigis ŝin dirante: “Fraŭlino, ni ne havas la saman sorton. Vi povas iri al via hejmo.” La rano kondukis ŝin al ŝia hejmo.

La rano redonis la duan fifnon al la tribestro kaj petis la plej junan.

La tribestro eksplodis de kolerego kaj tondre kriis: “Mi donis al vi la unuan filinon, vi revenigis ŝin; mi donis al vi la duan, vi denove rekondukis. Nun vi deziras la trian! Vi estas tro arbitra. Neniu tribestro en la tuta mondo tiom humiligis! Vi ... Vi...Vi... jam tro...” Li ne povis fini la vortojn pro sufoka kolerego. Li sentis, ke nun li ricevis tiajn ofendon kaj humiligon, kiujn li neniam spertis.

“Tribestro,” la rano kviete respondis, “Kial vi tiel koleras? Viaj du pliaĝaj filinoj ne volis iri kun mi, mi do redonis ilin. Ĉu ne estus bone, se via tria filino volus iri kun rni? ”

“Ne, ne, ne! Neniu knabino volas edziniĝi al rano. Mi jam lasis min disponiĝi de vi!”

La rano diris: “Mi saltus, se vi ne konsentus.” La tribestro sentis surprizon, sed la kolero ne forlasis lin kaj li furioze kriis: “Saltu! Saltaĉu! Mi ne estus tribestro, se mi timus vian saltadon.”

La rano eksaltis. La tero ekstremis kaj la montoj skuigiĝis kunpuŝiĝe. La firmamento pleniĝis de rokpecoj,

sablero, koto kaj ĉio alia. Kaj la kastelo ŝajnis renversiĝi.

La tribestro ŝovis la kapon el polvo kaj laŭte petis la ranon ĉesigi la saltadon kaj promesis doni la trian filinon. La rano ne saltis plu. La tero kvietiĝis, kaj la montoj revenis al sia loko.

La tribestro malvolonte ordonis rajdigi la trian filinon sur unu ĉevalo kaj ŝarĝi la alian per la doto.

La tria filino estis afabla kaj bonkora. Ŝi pensis alie ol la fratinoj. Laŭ ŝi la rano estis kapabla. Ŝi volonte iris kun ĝi.

La rano kondukis ŝin al la hejmo. La patrino atendis ĉe la pordo. Ŝi ne povis fermi la buŝon pro mirego. Ŝi fine murmuris al si: “Kiu imagis ke mia eta kaj malbela ido havas belan edzinon!”

La knabino estis tre laborema. Ŝi ĉiutage iris kun la bopatrino al la kampo. Tial la maljunulino amis ŝin kaj ŝi respektis la maljunulinon. Regis feliĉo kaj ĝojo.

Venis aŭtuno. Ĉiujare kutime okazis granda ĉevala konkurso, al kiu venis riĉuloj kaj malriĉuloj, portante siajn tendon kajmanĝaĵon. Ili bruligis bonodorajn branĉojn honore al dio, dancis, drinkis kaj ĉevalkonkursis. La gejunuloj kutime serĉis manon en tiu okazo. Ĉifoje la patrino volis, ke la rano vizitu kun ŝi la ĉevalkonkurson, sed ĝi skuis la kapeton kaj diris: “Lasu, panjo! Tiom da montoj. Mi ne atingos la konkursejon.” Tial li restis en la hejmo.

La festo okazis en sep tagoj. En la lastaj tagoj iris ĉevalkonkurso. Ĉiutage la venkintoj akceptis knabinojn,

kiuj dancis ĉirkaŭ ili kaj poste invitis ilin al la tendo de siaj gepatroj kaj fratoj por trinki sekalan vinon, faritan de la knabinoj mem.

En la lasta tago de la finalo, junulo en verda kostumo alrajdis sur verda ĉevalo. Li aspektis tre forta kaj eleganta; liaj vestoj estis faritaj el la plej bonaj brokaĵoj el silko; lia selo inkrustita per arĝento, oro kaj gemo; kaj lia pafilo, ornamita per arĝento kaj koralo. Ĉiuj fiksis la rigardon al li. Li petis partoprenon en la finala konkurso kaj ĉiuj tuj ĝoje konsentis.

Kiam la junaj rajdistoj jam startis, li aplombe ordis la selon. Dum ili galopis strebe ĉirkaŭ la vasta herbejo, la verda junulo surĉevale ŝargis la pafilon kaj paŭtrafis tri flugantajn aglojn. Rajdante preter la rigardantoj li desaltis de la maldekstra flanko, plukis kelke da oraj floroj, denove surĉevaligis kaj ĵetis la belajn florojn al la rigardantoj ĉe la maldekstra flanko. Poste li desaltis de la dekstra, kolektis arĝentajn florojn kaj ĵetis ilin al la rigardantoj ĉe la dekstra. Tion fininte li denove flugis kun la ĉevalo. Kiam lia ĉevalo rapide kuris sur la verda herbejo, oni vidis nur turbulan nubon. Ĉiuj rigardantoj ekstazis. Li postlasis ĉiujn rajdistojn kaj estis la unua al la celo.

Aŭdiĝis murmurado inter maljunaj homoj, amaoj kaj knabinoj: “ De kie li venis? Kian nomon li havas?”

“Neniam mi vidis, ke surĉevale oni pafas kaj desaltas jen de la maldekstra flanko por kolekti orajn florojn jen de la dekstra por kolekti arĝentajn florojn.”

“Kia forta kaj eleganta junulo! Nur li indas je la bela selo, bona ĉevalo kaj silka vesto.”

“Kian knabinon por tiel sana kaj ĉarma junulo?”

La knabinoj svarmis ĉirkaŭ la junulo. Ili loge kantis kaj tente dancis. Ĉiuj invitis lin al sia tendo por trinki vinon. Apenaŭ la suno subiris, la junulo haste saltis sur sian ĉevalon kaj forgalopis en la direkto de la hejmo de la rano.

Ĉiuj gapis al la polvo, kirliĝanta sub la hufoj de la verda ĉevalo.

Ankaŭ la edzino de la rano tre miris: “De kie tiu juna rajdisto venis? Kiel eleganta kaj forta li estas! Kiel li nomiĝas? Kial li forkuris tiel haste, kiam la suno ĵus malleviĝis? Eble li loĝas tre malproksime?” Ŝi, kiel la aliaj, iris hejmen obsedate de la mistero.

La rano renkontis ilin ĉe la pordo. Ili volis rakonti al ĝi pri la ĉevala konkurso, sed je ilia surpriziĝo, ĝi jam sciis pri la tuta okazaĵo kaj ankaŭ pri la nekonata rajdisto.

En la sekva aŭtuno okazis la sama konkurso. La gepatroj kaj la knabino kune iris tien.

Ĉiuj sopiris al la verda junulo sur la verda ĉevalo. Oni diris: “Se li venos, ni demandu lin pri la nomo, ankaŭ pri tio, kie li loĝas kaj al kiu tribo li apartenas?”

Venis la finalo, la junulo en verda kostumo, sur la verda ĉevalo, enkuris la konkursejon, kvazaŭ malsupreniĝinte de la ĉielo. Nun li portis ankoraŭ pli luksajn vestojn. Kiam la aliaj rajdistoj jam startis, li ankoraŭ sidis. Trinkinte teon li saltis lerte sur la ĉevalon.

Poste ripetigis la samo: ŝargi la pafilon kaj mortpafi tri aglojn; pluki orajn florojn kaj ĵeti al la rigardantoj ĉe la maldekstra flanko, kolekti arĝentajn florojn kaj ŝuti al la rigardantoj ĉe la dekstra flanko. Fine li denove estis la unua.

La knabinoj superŝutis lin per kantoj kaj okulumoj. Ili gaje dancis ĉirkaŭ li. Fine ili insiste invitis lin al sia tendo por trinki vinon, kiun ili mem faris. Sed, kiam la suno ekmalleviĝis, la junulo haste surĉevaliĝis sen diri adiaŭon.

La maljunuloj kaj maljunulinoj, la lamaoj, kaj la sentinnentalaj knabinoj fikse rigardis al la polvo levita de la hufoj. Ili ne sukcesis fari la demandojn.

Reveninte hejmen, la gepatroj kaj la knabino denove surpriziĝis, ke la rano scias ĉion.

La knabino tre miris pri tio. Kiel ĝi povis scii ĉion, se ĝi ne estis en la konkursejo? Kial la junulo rapidis hejmen antaŭ ol la suno malleviĝis? Kaj kial li forkuris en la sama direkto? Ĉu vere troviĝas tiel bona rajdisto en la homa mondo? Kia junulo, eleganta, forta, ĉarma! Ŝi decidis klarigi tion.

Venis la ĉevalkonkurso de la tria jaro. La knabino iris kun la gepatroj al la konkursejo. Ili bruligis branĉojn, dancis kaj drinkis. Sed en la lasts tago de la finalo, la knabino diris al la patrino: “Panjo, mi sentas malbone. Mia kapo pezas kiel ŝtonego. Mi volas iri hejmen. Lasu min rajdi sur la mulo.” La gepatroj tre amis ŝin kaj sidigis ŝin sur la malgrasa mulo, kiu alportis la tendon.

Malaperinte el la vido de la gepatroj, la knabino

tuj instigis la mulon troti al la hejmo. En la hejmo, ŝi serĉis la ranon. Sed ŝi ne trovis ĝin. Fine ĉe la fajrejo ŝi vidis ranan haŭton kiu aspektis ĝuste kiel tiu de ŝia edzo. Ŝi tenis ĝin en la manoj kaj ĝojaj larmoj perlis sur la vangoj. Ŝi kriis: “Ho, ĝuste ĝi, mia Rajdisto! Ho, Dio, kiel feliĉa mi estas! Mia edzo fakte estas eleganta kaj forta junulo kaj lerta rajdisto. Mi ne meritas! Mi ne meritas! Mi, feliĉa, kompatinda knabino!”

Ŝi viŝis la okulojn, sed larmoj denove verŝiĝis. Ŝi rigardis la ranan haŭton foje kaj refoje, kaj flame diris: “Kial vi devas porti tian haŭtacon de rano? Kial vi devas esti tiel malgranda kaj malbela? Ĉu mi vere ne meritas esti via edzino?”

Ju pli ŝi rigardis la ranan haŭton, des pli forte ŝi koleris. Ŝi pensis: “Mi forbruligu ĝin, alie, kiam li revenos hejmen, mi havos denove nur etan kaj malbelan ranon.” Kaj ŝi iris fari fajron.

Apenaŭ ŝi ekbruligis la ranan haŭton, la suno malleviĝis kaj subite la junulo, kvazaŭ verda nubo aperis antaŭ la fenestro.

Vidinte ŝin bruligi la ranan haŭton, la junulo tuj paliĝis. Li rapide saltis de la ĉevalo kaj forkaptis la haŭton el la fajro. Sed jam malfrue, nur la dekstra kruro restis. Li longe suspires kaj senforte falis sur grandan ŝtonon antaŭ la kabano.

La knabino konsterniĝis. Fine ŝi iris porti lin en la ĉambron.

La knabino malĝoje diris: “Mia kara edzo, vi estas bona junulo kaj lerta rajdisto. Kial do vi volas ŝanĝi vin

en ranon? Alies edzoj estas homoj, dum la mia, — rano.

Ĉu vi scias, kiom malfeliĉa mi estas? ”

La junulo respondis: “Knabino, vi estas tro malpacienca kaj faris tion tro frue. Vi devus atendi, ĝis mia forto elkreskos. Tiam ni feliĉe vivos. Sed ne nun. Mi ne vivus, kaj la popolo ne akirus feliĉon.”

La knabino demandis: “Ĉu mi kulpas? Kion fari?”

La junulo diris: “Ne pro vi, sed pro mia malatento. Mi volis provi mian forton, tial mi iris al la ĉevalkonkurso. Sed nun, nek ni nek la popolo havos feliĉon. Mi estas ne ordinara homo, sed la filo de Patrino Tero. Kiam mi havus sufiĉan forton, mi laborus por la popolo, por ke en la mondo la malriĉuloj ne estu tretataj de la riĉuloj, kaj popolanoj ne estu subpremataj de burokratoj. Sed nun mi ne elkreskis nek mia forto sufiĉe grandiĝis. Mi ne povas pasigi la frostan nokton sen la rana haŭto, mi mortos antaŭ la tagiĝo. Mi povus forĵeti la ranan haŭton se regus varmo ĉi tie. Kaj la varmo estiĝus nur post mia laboro por la popolo. Ĉi-vespere mi revenos al mia patrino.”

Ĉe tiuj vortoj larmoj torentis el la okuloj de la knabino. Ŝi ĉirkaŭprenis la malfortan junulon kaj dolore diris: “Ve al mi! Ne mortu, kara edzo! Vi devas vivi. Devas! Mi fidus vin.”

Vidinte, ke la knabino ploras tiel korŝire kaj kompatinde, la junulo treme prenis ŝian manon en sian kaj diris: “Mia juna edzino, ne tiel malĝoju. Se vi vere volas ke mi vivu, vi devas fari ion.” Montrante al

malproksima okcidento li daŭrigis: “Sed tio dependas de Dio. Tuj rajdu sur mia ĉevalo. Eble vi sukcesos, ĉar ĝi estas rapida. Iru en la ĉielan palacon inter ruĝaj nuboj. Kaj petu en la nomo de la popolo, ke Dio donu antaŭ la tagiĝo feliĉon al la popolo. Se jes, ĉi tie estos varme kaj agrable, kaj mi povos vivi sen mia ranohaŭto.”

La knabino tuj rajdis sur la ĉevalo kaj galopis for. La vento fajfis preter ŝi kaj la blanka nubo malantaŭeniĝis. Fine ŝi atingis la ĉielan palacon. Ŝi eniris ĝin kaj petegis Dion. Dio vidis ŝin sincera kaj promesis ĉion al ŝi.

Dio diris: “Vi estas sincera, mi promesas ĉion. Sed antaŭ la tagiĝo vi devas iri al ĉiuj familioj por informi la popolon pri la feliĉiĝo. Poste regos varmo kaj via edzo povos vivi sen la ranohaŭto.”

La knabino tre ĝojis. Dankinte Dion ŝi senprokraste reiris por disvastigi la sciigon al ĉiu familio antaŭ la tagiĝo.

Enirinte la valon ŝi vidis sian patron ĉe la pordo de la kastelo.

La patro kriis: “Kara filino, kio okazis? Kial vi rapidas sur la ĉevalo en profunda nokto? ”

La knabino respondis: “Vere, paĉjo. Dio promesis al mi mirindan aferon. Nun mi iras al ĉiu familio por fari anoncon.”

La tribestro diris: “Ne tiom hastu! Diru, kion Dio promesis al vi.”

La knabino respondis: “Paĉjo, ja tre urĝe. La tempo pasos. Mi rakontos poste.”

La tribestro diris: “Mi estas la estro. Vi devas unue rakonti al mi.” Li malsupreniris laŭ la perono kaj tiris la bridon de la ĉevalo.

Por liberiĝi de li, la knabino rakontis al li ĉion.

La tribestro kuntiris la brovojn kaj kriis: “Kio?! Se ne estus diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj, kian doton mi povus al vi kaj viaj fratinoj? Kiu paŝtu por ni gruntbovojn kaj ŝafojn? Kiu plugu nian kampon? Sensencaĵon vi alportis. Ne iru frenezi inter la popolanaĉoj!”

La knabino petis: “Paĉjo, mi devas jam foriri.” Sed la patro ne lasis ŝin. La koko kriis la unuan fojon. Ŝi maltrankviliĝis kaj spronis la ĉevalon.

Sed la tribestro firme tenis la bridon. Aŭdiĝis la dua kokeriko.

La knabino ekfuriozis kaj la ĉevalo ekbaŭmis faligante la tribestron. Kiam ŝi atingis la unuan domon en la valo, la koko kokerikis je la tria fojo kaj iom post iom tagiĝis. Tiam la ordonon de Dio ricevis nur kelkaj familioj.

La knabino turnis sin hejmen.

Ŝi vidis, ke la gepatroj ploras ĉe la mortinta junulo.

Jam ĉio vana! Ŝi falis sur la kadavron de sia plej kara edzo kaj ploradis amare, riproĉante sian patron kaj sin mem.

Ili portis la kadavron al krutaĵo. Ĉiuvespere la knabino iris tien. Ŝi jen ploris jen murmuris pri sia kulpo. Fine ŝi fariĝis ŝtono.

La ŝtono restas. De malproksime ŝi ŝajnas knabino
firme staranta, kun longaj haroj falantaj sur la ŝultrojn.
Ŝi kvazaŭ preĝas ankoraŭ, gardante la korpon de sia kara
rano-rajdisto.

Ĝomaĝi

Antaŭ longe, en malproksitna lando, estis reĝido, tre petolema, sed bonkora.

Iun tagon, la reĝido katapultis birdon sur balkono. De sur la kontraŭa ebenejo ŝancelpaŝe alvenis maljunulino, kun sitelo da akvo sur la dorso. La petolema reĝido tuj levis sian katapulton kaj celante la sitelon, ekpafis. La sitelo fendiĝis, kaj la akvo elfluis.

La miljunulino tre koleris kaj jam malfermis la buŝon por insulti, sed, rimarknte, kiu estasla pafinto, ŝi sin regis. Ŝi sentis ĉagrenon. Ŝi sidis senpove sur la tero kaj plorĝemis, karesante la malplenan sitelon.

Ĉion la reĝido vidis. Li sentis sin kulpa antaŭ la maljunulino. Li do kuris al la ebenejo por peti pardonon. Li trovis pecon da ligno kaj riparis la sitelon. Poste li iris al la ls rivero por ĉerpi akvon. Li revenis al la maljunulino, metis la sitelon sur ŝian dorson kai subtenis ŝin hejmeniri.

La vizaĝo de la maljunulino sereniĝis. Ŝi preĝis en la koro, ke la reĝido havu feinon-edzinon. Ŝi diris ridetante:

“Ho, reĝido, vi estas bonkora. Mi benas vin, ke vi edziĝu al Ĝomaĝi.”

La reĝido neniam aŭdis pri Ĝomaĝi kaj scivole demandis:

“Kiu estas Ĝomaĝi, avino? Ĉu bela? Kies ŝi loĝas? ”

La avino respondis:

“Ĝomaĝi estas la plej bela feino. Ŝi loĝas en tre tre malproksima loko.”

Aŭdinte tion, la reĝido decidis iri por serĉi Ĝomaĝi kaj peti ŝian manon. Li insistis, ke la avino sciigu, kiel trovi Ĝomaĝi. La maljunulino vidis, ke li estas sincera, ŝi do diris:

“Rajdu sur plej rapida ĉevalo kaj galopu tagnokte. En la deka tago vi vidos densan arbaron de oranĝo. La nesto de Ĝomaĝi troviĝas sur la plej granda kaj folirica oranĝarbo. Grimpu, kaj vi trovos oranĝon. Ĝi brilas kvazaŭ oro, malgrandas kiel ovo. Ŝiru kaj mete ĝin en vian sinon, kaj poste tuj forrajdu. Bone gardu ĝin kaj ne enrigardu survoje. Alie Ĝomaĝi forflugus.”

La reĝido ŝin dankis kaj dankis. La reĝido adiaŭis la maljunulinon, sed ŝi retenis lin, kaj diris:

“Nepre elektu bonan tagon, por survoje ne trafi ventegon aŭ katastrofon.”

La reĝido revenis al la palaco. Li brulis de malpacienco. Tuj ! Ek! Demandi paĉjon? Ne! Paĉjo donos nek konsilon nek konsenton. Li paŝis febre tien kaj reen, kvazaŭ formiko en arda pototo. Finfine la suno subiris, kaj la tuta familio endormiĝis. Li kuris al la stalo, elkondukis blankan ĉevalon kaj saltis sur ĝin. Li rapidis sub la klara luno, en la direkto indikita de la maljunulino.

La ĉevalo galopis senhalte. Ĝi pasis kaj neĝmontojn kaj glaciejojn kaj riveregojn kaj stepojn, kaj en la deka tago atingis arbaron. La reĝido haltigis la

ĉevalon, iom rigardis, kaj malrapide eniris. Vere, interne de la arbaro troviĝis granda kaj foliriĉa arbo, kun multegaj oranĝoj. Ĝi firme stasis, regante super la aliaj arboj. Jen ĝusteĝi! La reĝido deĉevaliĝis kaj surgrimpis la arbon: Li serĉadis per la rigardo. Subite la okulojn frapis ekbrilo el inter la densaj kaj verdaj folioj. La reĝido tuj ŝovis sin tien kaj trovis oranĝon, ore brilan kaj ove malgrandan. Li preskaŭ falis de ĝojo. Li milde plukis la oran oranĝeton kaj kaŝis ĝin ĉe la brusto.

Subite aperis uragano, kirliĝis sableroj kaj ŝtonetoj, obskuris la ĉielo kaj la tero, kaj ŝanceliĝis la granda oranĝarbo. Nur nun la reĝido ekmemoris la vortojn de la avino, ke li elektu bonan tagon. Nu, kion fari? Li firme tenis la oranĝon, atendente kvietiĝon de la ventego, kiu tamen pli kaj pli fortiĝis. La reĝido falis kaj svenis. Malgraŭ ĉio li neniel lasis la oranĝon.

Oni ne sciis, kiom da tempo pasis. La uragano cesis, kaj la blanka ĉevalo kviete manĝis herbon sur la tero. La reĝido rekonsciiĝis kaj palpis la oranĝon, kiu bone sidis en lia sino. Li ne kuraĝis plu resti tie. Li do tuj leviĝis kaj saltis sur la ĉevalon. Li vipis la ĉevalon, kaj ĝi sagis el la arbaro.

Survoje la reĝido plurfoje intencis ŝiri la ŝelon por vidi, kiel Ĝomaĝi aspektas. Sed rememorante la admonon de la maljunulino, li forpelis la scivolon. Li rajdis tagnokte. Fine venis la deka tago, kiam vidiĝis de malproksime la palaco. “Ho, finfine mi atingas la hejmon,” diris la reĝido al si. Li jam ne povis plu regi sin. Li do faris fendeton en la ŝelo kaj — jen pafiĝis

blindiga lumo, tra kiu apenaŭ vidiĝis bela knabino. Tiam sablo kaj ŝtonetoj denove uraganis. La reĝido tuj fermis la ŝelon kaj tenis ĝin firme en la sino. Li forte spronis la ĉevalon kaj baldaŭ atingis la palacon.

En tiuj tagoj la maljunaj gereĝoj ege maltrankvilis pro la filo. Ili sendis armeon da homoj por serĉi lin. Ili venigis lamaojn por preĝi. Sed ĉio vanis. Nun la reĝido subite aperis, kaj la maljuna paro tiom ĝojis, ke ambaŭ jen ridis, jen brakumis, dum longa tempo. Fine ili iom kvietiĝis kaj, tenante la manojn de la reĝido, demandis lin pri tio kaj tio. Vidinte, ke la gepatroj ne riproĉas, la reĝido rakontis ĉion, kio okazis al li, kaj petis, ke ili permesu al li edziĝi al Ĝomaĝi.

Aŭdinte, ke Ĝomaĝi estas feino, la maljunaj geedzoj konsentis, kaj promesis elekti por li feliĉan tagon de geedziĝo. Ili diris cetere, ke oni havigos al la estonta bofilino belan servistinon.

Por fariĝi servistino de la bela Ĝomaĝi, ĉiutage alvenis multe da knabinoj el ĉiuj anguloj. Ili svarmis en la palaco, sed neniu taŭgis, ĉar Ĝomaĝi estis tro bela. En la lasta tago de la elektado venis junulino, kiu tiom similis Ĝomaĝi, ke ili ŝajnis ĝemeloj. La maljunaj gereĝoj kaj la reĝido ĝojis kaj elektis ŝin kiel servistinon de Ĝomaĝi. Kaj neniu atendis, ke la elektita servistino estas insidema sorĉistino.

Post la geedziĝo la reĝido kaj Ĝomaĝi ĝuis la amon kaj feliĉon.

Iun tagon, la reĝido kaj Ĝomaĝi ludis en ĝardeno. Laciĝinte de la ludado, la reĝido falis en dormon, ĉe la

sino de Ĝomaĝi. Tiam la sorĉistino, staranta apud ili, mordetis al si la lipojn kaj ekhavis aĉan ideon. Ŝi diris al Ĝomaĝi:

“Ĉiuj admiras vian ĉarmon, sed mi pensas, ke mi pli belas ol vi; se vi ne kredas, ni iru al la lago fari komparon. Bone, ke la reĝida moŝto dorms.”

Ĝomaĝi, opinianta sin la plej bela, kompreneble ne cedis. Ŝi do diris:

“Nu, bone.”

Ŝi delikate formovis la reĝidon for de sia sino kaj, tenante la sorĉistinon je la mano, iris al la lago. Ili staris ĉe la bordo, kaj la akvo tuj spegulis du belajn knabinojn, ĝemele similajn unu al la alia. Oni ne povis tuj distingi ilin ĉe la unua vido, sed post pli zorga pririgardo, oni trovis, ke Ĝomaĝi efektive estas pli bela ol la sorĉistino, kaj ankaŭ ŝia teniĝo pli libera kaj senĝena.

Tion la sorĉistino mem vidis, sed ŝi neniel volis konfesi. Ŝi diris:

“Vi ne estas pli bela ol mi! Sed vi portas tiajn vestojn kaj juvelojn. Vidu, kiel bele sidas vestoj silkaj kaj lanaj sur via korpo! Kiom brilas perloj kaj koraloj kaj oro kaj gemo sur via kapo! Sed mi, ĉifone vestita. Ĉu vi ne kredas? Nu, ni do ŝanĝu la vestojn kaj ornamojn! Tiam vi konfesos, ke mi diris la veron.”

Ĝomaĝi neniom suspektis ŝin pri la fiintenco. Ŝi pensis: “Mi certe pli belas ol vi en kia ajn vesto.” Ŝi demetis la vestojn kaj juvelojn, donis ilin al la sorĉistino kaj surmetis ties simplajn vestojn. La sorĉistino diris:

“Rigardu, rigardu, kiu estas pli bela efektive? ”

Kiam Ĝomaĝi atente rigardis en la akvon, la sorĉistino forte puŝis ŝin per la manoj. Kaj “bum!” la akvo ŝaŭmis. Ĝomaĝi dronis en la lago.

La sorĉistino ekrikanis kaj revenis al la reĝido. Ŝi facile lin portis kaj alpremis al la sino.

Post momento la reĝido vekiĝis. Malferminte la okulojn, li murmuris:

“Mi ne scias, kiel mi alpremiĝis al vi kaj endormiĝis en via sino.”

Imitante la voĉon de Ĝomaĝi, la sorĉistino diris:

“Ho, reĝido, vi longe dormis; jam tempas hejmeniri.”

La reĝido miris pri la foresto de la servistino. Li demandis:

“Kie la servistino?” La sorĉistino respondis:

“Mi jam ŝin hejmenigi.”

La reĝido subite sentis ion strangan ĉe la edzino. Li fikse rigardis ŝin per large malfermitaj okuloj. La sorĉistino tute ermbarasigis. Ŝi demandis kun kontraŭvola rideto:

“Kial vi tiel rigardas min? ”

Post iom da hezito la reĝido diris:

“Vi ŝajne iom ŝanĝiĝis, via voĉokaj mieno jam aliĝis.”

Pot nuligi la suspekton de la reĝido, la sorĉistino diris:

“Mi estas feino. Se mi longe vivas en la homa mondo, kompreneble mi povas ŝanĝiĝi, kaj poste la

ŝanĝiĝo estos ankoraŭ pli grand.”

La reĝido kredis ŝin kaj ne tuŝis plu tion. Post kelkaj tagoj en la lago aperis ora lotuso. Ĝi floris en la vento.

Iun tagon, ĉevalisto de la reĝido iris al la lago por trinki ĉevalon kaj de malproksime li jam vidis ion ore brilantan en la centro de la lago. Alproksimiĝinte li klare vidis, ke tio estas ora lotuso. Li haste revenis al la palaco kaj raportis tion al la reĝido:

En tiuj tagoj la reĝido mem ne sciis, kial li tiom ĉagreniĝis. Li vidis, ke la edzino tute ŝanĝiĝis, jam ne tiel milda, nek tiel amema. Aŭdinte la raporton de la ĉevalisto, li ne povis sin deteni kaj kuris al la lago, sed strange, antaŭ li estis nur kvieta akvo. Nenio vidiĝis, por ne paroli pri la ora lotuso. Li ne povis rezigni kaj refoje iris tien en la sekvanta tago, sed same nenio vidiĝis, krom ondetanta akvo. La samo okazis en la tria tago. La reĝido pensis: “Eble la ĉevalisto misvidis, alie, li intence trompis min.”

Sed la ĉevalisto ĵuris, ke li ververe vidis la oran lotuson. Poste li konsilis:

“Eble la ora lotuso vin timas kaj sin kaŝas. Surmetu miajn vestojn kaj provu refoje.”

La reĝido opiniis lian ideon bona. Ili do interŝanĝis la vestojn. Li estis tiel malpacienca, ke li maldormis la tutan nokton. Apenaŭ la unuaj sunradioj aperis, li tuj elkondukis la blankan ĉevalon kaj rajdis al la lago. Ĉifoje li klare vidis la oran lotuson, kiu brilegis de la matenruĝo, kronante la smeraldajn ondetojn. Ju pli li

rigardis, des pli la lotuso plaĉis. Ŝajnis al li, ke li iam vidis tiun ĉi lotuson, sed li ne povis rememori kiel. Klininte la kapon, li preĝis kun manoj kunigitaj:

“Ho, bodisatvo, bonvolu min beni per la ora lotuso!”

Fininte la preĝon, li plonĝis en la lagon kaj naĝis al la ora lotuso, kiu, ŝajne lin konanta, balanciĝis en la vento, kvazaŭ lin vokante. Li fine ĝin atingis, etendis la manon kaj ŝiris ĝin.

La reĝido revenis en la palacon, tenante la oran lotuson ĉe la brusto. Li starigis ĝin oran vazon. Ĉu tage, ĉu nokte, li sidadis antaŭ ĝi, en granda konsoliĝo.

Sed kiel ruza estis tiu sorĉistino! Nenio povis trompi ŝiajn malicajn okulojn. Ŝi tuj rekonis Ĝomaĝi en la formo de ora lotuso. Jen kial ĝi tiel blindige brilis kaj tiel sorĉe pompis, kaj tiom ravis la reĝidon. Ĵaluza rmalamo kirlis la sorĉistinon. Iun tagon la reĝido iris ĉasi. La sorĉistino rapidis en la ĉambron, eltiris la oran lotuson kaj iris al nekonata valo. Ŝi kolektis sekajn branĉetojn, bruligis ilin kaj ĵetis la oran lotuson en la fajron. La ora lotuso tuj forvelkis, nigriĝis kaj fariĝis cindro. La sorĉistino revenis al la palaco estante ekster si de ĝojo.

Post kelkaj tagoj el la lotuscindro aperis verdverda burĝono, ĝi rapidege kreskis en la suno kaj vento. Nur en kelkaj tagoj ĝi jam fariĝis granda nuksarbo alta je dekoj da metroj kaj dika je plurhoma ĉirkaŭprenon. La folioj densaj, la fruktoj abundaj.

Post la forbruligo de la ora lotuso, la sorĉistino

povis nek sidi nek kuŝi kaj falis en maltrankvilon. Ŝi timis, ke denove io okazos. Kelkajn tagojn poste ŝi iris al la valo por rigardi ĉu iio okazis tie. Vidinte la gigantan nukstarbon el inter kuriozaj ŝtonoj, ŝi tuj rekonis, ke ĝi transformiĝis el Ĝomaĝi, kaj paliĝis de kolerego. Ŝiaj okuloj rapide turniĝadis, kaj tuj venis al ŝi malica ideo.

Vespere ŝi diris kun ŝajnigita sincero al la reĝido:

“Hodiaŭ mi iris ĉasi kaj vidis en iu valo grandan arbon kun sennombraj nuksoj. Mi volas fari bonon al la popolanoj. Mi do donacu la nuksojn al ili.”

La reĝido trovis ŝin prava kaj tuj akceptis la proponon. Cirkulis la reĝida orodno: “La reĝido donacos nukson al ĉiu popolano. Mem iru pluki!” La novaĵo estis sensacia inter la popolanoj. Kiu ne volis ricevi donacon de la reĝido? Ĉiuj konkure rapidis al la valo. Iuj grimpis ŝiri, aliaj batis per stango. La dezerta valo ekbolis kaj baldaŭ la arbo tute nudiĝis. Vespere de la sama tago, la sorĉistino ordonis dehaki la arbon kaj ĝin forbruligi. Tiu ĉi fajregoj estingiĝis nur post tri tagoj kaj noktoj.

Malantaŭ la palaco estis malriĉa familio el patrino kaj filo. La filo ĉiutage iris paŝti ŝafojn sur monto kaj la patrino mastrumis en la hejmo. Ili vivis mizere. En tiu tago, kiam oni deŝiris la nuksojn, la filo jam iris paŝti la ŝafojn kaj revenis hejmen ĉe vesperiĝo. Informiĝinte pri tiu novaĵo, li tuj kuris al la valo. Sed jam tro malfrue, la homoj jam foriris kaj la nuksoj jam ne restis. La filo ne volis lasi la okazon kaj hejmeniri kun malplenaj manoj, li serĉadis en la valo kaj finfine trovis en fendo de ŝtonegoj unu nukson, grandan, rondan kaj verdverdan.

Li glutis la salivon kaj portis la nukson hejmen.

“Panjo, ĝin manĝu! Tio estas donaco de la reĝido,”
diris la filo.

Vere plaĉis la ronda, verdverda kaj bonodora nukso.
Ankaŭ la patrino tre domaĝis ĝin. Ŝi pensis: “Mi
konservu ĝin por la filo! Li laboregas ĉiutage de mateno
ĝis vespero.” Kaj ŝi metis la nukson sur la
fenestrobreton.

Frumatene de la sekvanta tago la filo, kiel kutime,
jam iris paŝti la ŝafojn, kunportante iom da sekalaĵo en
sako, kaj la patrino sin okupis pri hejmaj bagateloj.
Tagmeze la patrino iris ĉerpi akvon por pretigi sian
manĝon. Reveninte ŝi rimarkis, ke la tagmanĝo jam
pretas. Jen kruĉo da buterteo, bonodora kaj varma, sur la
kamenon. La patrino gape miris. Kiu faris tion? Vespere,
kiam la filo revenis, ŝi rakontis al li ĉion okazintan.
Ankaŭ li konfuziĝis kaj ne komprenis, kio okazis.

La samo okazis en la sekvantaj tagoj. Ili
interkonsiliĝis kiel malkaŝi la misteron.

Matene la filo eliris kiel antaŭe. Ankaŭ la patrino
iris eksteren kun sitelo. Sed post ne longe ili sin reiris
hejmen. La patrino sin kaŝis ĉe la pordo kaj la filo
surgrimpis la lukon por rigardi internen. Kaj fine: Krak!
— kredo de la nukso sur la fenestrobreto. Sekve ora
lumo dispaŝiganta, kaj jen — bela knabino leviĝanta el
la nukso. Nu, ŝi surterigis, kuspis la manikojn kaj
ekhejtis la kamenon. La manetoj lertaj kaj spertaj, kaj
baldaŭ la manĝaĵo surtabliĝis. Ĉe tio la patrino estis
kvazaŭ alnajlita al la loko.

“Kies bela filino? Neniam vidita!”

Ĉion fininte la knabino paŝis al la fenestro.

Sed ŝi ne sukcesis ennuksii, ĉar la patrino jam kaptis ŝin je la basko.

“Kio vi estas? Ĉu feino? Ĉu fantomo?”

“Mi ne estas fantomo, mi estas Ĝomaĝi.”

La patrino diris:

“Ho feino! Jen jen! Kial tiom bela!... Sed pro kio vi venis en la nukson?”

Ĝomaĝi ellasis fortan ĝemon. Poste ŝi detale rakontis al la patrino sian devenon kaj malfeliĉon. La patrino larmis de kortuŝiĝo.

“Mi havas nur unu filon. Se vi ne abomenas nin pro la malriĉo kaj mizero, loĝu ĉe ni kaj estu mia filino.”

Ĝomaĝi diris: “Tre bone. Se vi tenos la sekreton kaj diros al neniu, mi volonte estos via filino.”

Ĝomaĝi fariĝis unu el trio de la familio. Ĉiutage ŝi helpis la patrinon en la mastrado; sed ŝi neniam eliris, ĉar ŝi timis, ke oni ŝin vidos; tial ŝi neniam sin okupis pri portado de akvo, kolektado de brulligno.

Tiel ŝi trankvile pasigis kelkajn tagojn. Foje la patrino diris al ŝi:

“Hodiaŭ estas suna tago, portu la legomon sur la tegmenton por sunumi.”

Ĝomaĝi ne emis tion fari, ĉar la kabano situis ĝuste malantaŭ la palaco. Ŝi timis, ke la sorĉistino ŝin rekonos kaj denove io malfeliĉa okazos. Sed la konscienco malpermesis al ŝi rifuzi la patrinon, kaj plie ŝi esperis revidi la reĝidon, almenaŭ ĵeti kelkajn rigardojn al li.

Kiom ŝi sopiris al la reĝido! Tial ŝi obeis la patrinon.

Ŝi surmetis ĉapelon por ŝirmi la vizaĝon. Sunumante la legomon, ŝi kaŝrigardis al la palaco, esperante renkontiĝi kun la reĝido. Sed malbona ŝanco! Post matenmanĝo la sorĉistino supreniris la supran etaĝon por sin distri. Starante sur balkono ŝi sencele rigardis tien kaj tien.

Subite ekblovis ventego, kaj la ĉapelo de Ĝomaĝi forflugis. Ŝi ne sukcesis kapti ĝin.

“Aj!” aŭdiĝis ŝia krio.

La sorĉistino aŭdis la krimon. “Kiel konata la voĉo!” ŝi diris al si kaj, kiam la ventego kvietiĝis, ŝi ĵetis la rigardon al la kontraŭa flanko. Ŝi ekteremis de teruro: “Ĉu tio ne estas Ĝomaĝi? Ŝi ankoraŭ vivas?” Nubo da malĝojo kovris ŝian vizaĝon kaj ŝi tuj malsupreniris.

Ŝi venigis kvar gigantojn kaj kvar furiojn, kaj ordonis al ili:

“En la domaĉo malantaŭ la palaco troviĝas bela knabino. Ŝi estas sorĉistino, fatala al nia reĝo. Mi ordonas, ke vi ligu ŝin per ŝnuroj, portu ŝin al la malproksima ebenejo, bruligu ŝin kaj disŝutu la cindron ĉirkaŭ la ebenejo. Tiel la reĝo estos sekura kaj la rikolto riĉa.”

La ok ordonitoj kiel malsataj lupoj entrudiĝis en la domon de la maljuna patrino kaj ligis Ĝomaĝi. La patrino sin kroĉis al Ĝomaĝi, malhelpante la forkondukon. Ŝi kaj ploris kaj riprooĉis. Ĝomaĝi sciis, ke tio estas denove la ruzaĵo de la sorĉistino, ŝi do diris nenion, nek baraktis nek ĝenis. Ŝi konsolis la patrinon:

“Panjo, ne grave! Trankviliĝu, mi certe revenos.”

Ili forpuŝis la patrinon kaj perforte portis Ĝomaĝi el la kaboano.

Sur la ebenejo oni jam bruligis lignon. La flamoj vigle saltadis. Starante apude kun rigida mieno, la sorĉistino ordonis ĵeti Ĝomaĝi en la fajron. Kolono da fumo leviĝis al la ĉielo, kaj restis nur amaso da cindro. Sub la kontrolado de la sorĉistino, oni disŝutis la cindron ĉirkaŭen de la ebenejo, Grincigante la dentojn, la sorĉistino diris:

“Mi volas vidi, kian rimedon vi ankoraŭ havos?”

Estis strange, ke tiunokte sur tiu izolita ebenejo laŭlonge de la loko, kie sterniĝis la cindro de Ĝomaĝi, aperis naŭetaĝa palacego kun oraj skulptitaj kolonoj kaj traboj.

De post la forŝtelo kaj forbruligo de la ora lotuso fare de la sorĉistino, la reĝido trenis la tagojn de malespero al malespero. Lin ĉagrenis forte, ke lia edzino fariĝis ĉiam pli kruela kaj malica. Li jam ne povis elteni, tial li migris ĉien kun sia ĉevalisto. Li sencele rajdis kaj trafis al la ebenejo. La peizaĝo lin vekis. Li jam vidis imponan palacon. Li turnis la kapon al la ĉevalisto kaj demandis:

“Kies palaco?”

Ankaŭ la ĉevalisto tre miris. Li diris:

“Antaŭ kelkaj tagoj mi paŝtis ĉi tie la ĉevalojn, kaj sur la ebenejo estis nur herbaĉoj. Nur en kelkaj tagoj leviĝis naŭetaĝa palaco! Homoj ne kapablas. Certe sorĉaĵo.”

La ĉevalisto ektimis ĉe siaj vortoj. Li urgis la reĝidon hejmeniĝi. Sed la reĝido deĉevaliĝis kaj ordonis, ke la ĉevalisto restu sur la ebenejo, kaj li mem sin direktis al la palaco. Kiam li proksimiĝis al la palaco, subite sub liaj piedoj aperis amaso da diverskaloraj floroj, kiuj sin balancis en la vento, kvazaŭ lin bonvenigante.

Antaŭ la palaco kaŭris du grandaj hundoj. La kvar rondigitaj okuloj sin fiksas kun stranga brilo al li. La reĝido ne kuraĝis plu iri antaŭen. Post momento li trovis, ke la hundoj ne malamas lin. Tiom pli, ili swingis la voston por saluti lin. Li do sin kuraĝigis kaj surpaŝis la peronon.

En la palaco estis malplene kaj kviete, troviĝis neniu. Li suriris la ŝtuparon kaj venis al la dua etaĝo. Ankaŭ tie vidiĝis neniu. Kial neniu en ĉi bela palaco? Ĉu vere neniu loĝas ĉi tie? Li serĉis en ĉiu etaĝo.

Fine, jen belega feino, rekte sidanta en la preĝoĉambro de la naŭa etaĝo! Vidinte la reĝidon, ŝi iom movis la lipojn. Ŝajne ŝi volis ion diri. Sed ŝi diris nenion, nur klinis la kapon, kvazaŭ suferante de neeldirebla maljustaĵo.

La reĝido estis kvazaŭ alnajlita al la loko ĉe la vido de la feino. Tiu ĉi bela knabino, ŝajnis al li, estis konata, sed li neniel povis rememori tion.

Post momenta silento la knabino diris:

“Ĉu vi jam ne konas min?”

La reĝido sentis, ke ŝia voĉo estas belsona, tre konata kaj kara. Subite li rememoris: Ĉu tio ne estas

Ĝomaĝi? Jes, tio estas ĝuste la aspekto de la antaŭa Ĝomaĝi. Sed li tute perpleksiĝis: Ĝomaĝi ja estas hejme! Kiel ŝi venus ĉi tien? Ĉu ne vere sorĉaĵo?

Vidinte, ke li ne respondas pro hezito, ŝi diris denove:

“Mi estas Ĝomaĝi, la antaŭa Ĝomaĝi.”

La reĝido ankoraŭ pli konfuziĝis. Li large malfermis la okulojn:

“Ĉu vi vere estas...?”

La knabino diris:

“Mi vere estas Ĝomaĝi...”

Larmoj perlis el ŝiaj okuloj. Ŝi detale rakontis al la reĝido la historion, kiel la sorĉistino persekutis ŝin. La reĝido tre afliktiĝis pro la historio, kaj ankaŭ li verŝis multe da larmoj. Fine Ĝomaĝi diris:

“La katastrofo jam pasis, la feliĉo baldaŭ alvenos, kaj ni neniam disiĝos.”

Nun la reĝido ekkomprenis, kial li ĉiam sentis, ke la edzino fariĝis tute alia. Jen, ŝi ne estas la vera Ĝomaĝi, ŝi estas sorĉistino. Li tre indignis kaj volis rapidi hejmen por likvidi la sorĉistinon kaj venĝi Ĝomaĝi.

Sed Ĝomaĝi restis trankvila. Ŝi diris:

“Ne necese. Ŝi mem venos al la fino. Baldaŭ.”

Dum tiu tempo la ĉevalisto staradis sur la ebenejo. Li atendis kaj atendis. Li ektemis kaj forkuris sur la blanka ĉevalo en la reĝan palacon. Li raportis al la sorĉistino:

“Granda palaco sur la ebenejo, certe sorĉaĵo. La reĝido eniris kaj monstro lin formanĝis!”

La sorĉistino tuj komprenis, ke Ĝomaĝi faris tion. Malamege ŝi grincigis la dentojn, forpuŝis la ĉevaliston, sin ĵetis kiel vento al la palaco kaj entrudiĝis.. Ŝi supreniris etaĝon post etaĝo, kaj kiam ŝi atingis la naŭan, aŭdiĝis “bum” kaj ŝi enfalis en profundan kavon, de la naŭa etaĝo ĝis la tero. Ĝomaĝi antaŭvidis, ke la sorĉistino nepre alrapidis, tial ŝi fosis en la palaco la profundan kavon. Tiam la reĝido alvokis aron da homoj kaj ordonis forbruligi la sorĉistinon.

La reĝido kaj Ĝomaĝi loĝis en tiu ĉi bela kaj grandioza palaco. Ili ĝuis feliĉon kaj ĝojon dum la tuta vivo.